

& Cigno kaj alvuso:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 175 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:25> (a;La /dore mi mi;fa mire Ti Ti;La Tido re re;mi reTi La La;La dore mi mifa mire Ti Ti;La Tido re remi reTi La La)×7)+

(&Strofoj:

'1 La fiŝidaro ; en eta lago ; traserĉis akvon ; laŭ la zigzago.

(×:; **Kaj fiŝoj naĝas profundan akvon, ; volas plenigi sian stomakon.**)

'2 Kaj aperigis ; grandan novaĵon, ; ĝin mire gapis ; en la vizaĝon.

'3 Enigma birdo ; la blanka cigno ; kun longa kolo - ; demando-signo:

'4 Ho, via Moŝto, ; ĉu estas vero, ; vi bele kantas ; en mort-mizero...?

'5 Nu, povas esti, ; vi punkto-strekoj, ; ke iam kantas ; la cigno-bekoj.

'6 Mi ĝis nun vivas ; en plena sano, ; neniel pensas ; pri la nirvano.

'7 Ja min persone ; trafis feliĉo: ; en mia lago - ; da vi sufiĉo!